

An aerial photograph of a steep, rocky mountain trail. A long line of hikers is seen ascending the path, which is carved into the rock face. The surrounding area is covered with dense green and autumn-colored trees. The text 'Flava Rivero' is overlaid in a stylized green font, with the Chinese characters '黄' (Huang) and '河' (He) in red above it.

Flava Rivero

Duonjara Revuo

2/2022

Enhavo

Kong J. Ĝ.	3
Tri avertaj rakontoj	11
Serĉi pretekston por viziti patrinon.....	14
La Ĉerizoj.....	17
Viruso.....	22
“Ho, mia kor’!”	22
Sur la skioj	23
Poemoj de Hsü Tzi Mo	25
La „uloj“ en Esperantujo.....	27
Pli bonas fari sola.....	31
Bela rideto kaj taŭga dentopurigado	37
Klasika pizosupo	41
La mondo ridas... ..	43
Vivo tra la objektivo	47
Por via vetur' al foro (kanto).....	50

Kovrilo: Supervenko de Huashan-monto, fotita de Hou Zhiping



<http://flavarivero.cn>

6-a jarkolekto

2/2022 (12)

Ĉefredaktoro: Zhang Xuesong

Redaktas: Redakcio Flava Rivero

Eldonas: Esperanto-Studio

Retpoŝto: redakcio@126.com

Retejo: <http://www.esperanto.studio>

Kong J. Ĝ.

de Lu Sin trad. Venlo Fon

La interna aranĝo de trinkejoj en la urbeto Lu estas malsama, ol en aliaj urboj: en ia fronto estas granda montrotablo, malantaŭ ĝi estas pretigita varma akvo, en kiu oni povas iam ajn varmigi trinkaĵon. Laborantoj, fininte sian laboron tagmeze aŭ antaŭvespere, ofte elspezas kvar kupromoneretojn por aĉeti tason¹ da trinkaĵo, — tio estis antaŭ pli ol dudek jaroj, nun por ĉiu taso la prezo estas ĉirkaŭ dek moneretoj — staras antaŭ la montrotablo, trinkas, kiam la trinkaĵo ankoraŭ estas varma, kaj ripozas; se oni volus elspezi alian monereton, oni povus aĉeti telereton da salita bambuĝermo aŭ hŭejŝiangfabo² por manĝi kune kun la trinkaĵo. Sed multaj el tiuj ĉi klientoj estas “mallongvestuloj” kaj ne povas esti tiel luksemaj. Nur “robuloj” povas enpaŝi la najbaran trinkĉambron, alporti trinkaĵon kaj manĝaĵojn kaj manĝi kaj trinki malrapide.

De mia dekdva jaro, mi servas kiel kelnero en Ŝianheng-Trinkejo ĉe la enirejo de la urbeto. La trinkejestro diris, ke mi



¹Malriĉuloj ofte trinkas el taso anstataŭ glaso.

²fabo spicita per hŭejŝiang (fenkolo).

estas tro stultaspekta, eble ne povas servi la robajn klientojn, do mi faru ion ekstere. Sed senfine babiladis ne malmultaj el la eksteraj klientoj mallongvestaj, kvankam ili estis facile trakteblaj. Ili ofte ne trankviliĝis, ĝis ili propraokule observis, kiel la flava trinkaĵo verŝiĝas el vazo, ĉu estas akvo en la fundo de kruĉo, kaj ĉu la kruĉon oni metas en varman akvon por ĝin varmigi; sub tia severa kontrolo, estis tre malfacile enmiksi akvon. Tial post kelkaj tagoj la trinkejestro denove diris, ke mi ne povas ĉi tion fari. Feliĉe mia rekomendinto estis influa, kaj ne estis eble min maldungi, do mia tasko aliĝis en la seninteresan trinkaĵvarmigadon.

4 De tiam mi tuttage staris interne de la montrotablo kaj faris nur mian taskon. Kvankam mi ne misfaris mian taskon, mi sentis iom da monotono kaj enuo. La trinkejestro havis severan vizaĝon, askaŭ la klientoj ne estis mildatonaj, tiel, ke oni ne povis esti vigla; nur kiam Kung J. Ĝ. venis, oni povis iom ridi, kion, sekve, mi ankoraŭ memoras.

Kung J. Ĝ. estis la nura homo, kiu trinkis starante kaj tamen portis robon. Li estis altstatura, lia vizaĝo estis pala kaj ofte havis vundrestaĵojn inter la faldoj; lia barbo estis taŭzita kaj duonblanka. Kvankam li portis robon, tamen ĝi estis kaj malpura kaj eluzita, kvazaŭ ne flikita kaj ne lavita jam



kvindek³ jarojn. Kiam li parolis, li ĉiam uzis la vortojn *ĵi*, *hu*, *ĵe*, *je*,⁴ ke oni lin duone komprenis kaj duone ne komprenis. Ĉar lia famflia nomo estis Kung, oni prenis por li la moknomon Kung J. Ĝ.⁵ el la d-uonkomprenita frazo supra granda homo Kung J. Ĝ. en skribmodelo. Kiam Kung J. Ĝ. alvenis, ĉiuj trinkantoj, rigardante lin, ekridis, kelkaj kriis: “Kung J. Ĝ.; sur lia vizaĝo, plimultiĝis la cikatroj!” Li ne respondis, sed diris al malantaŭ la montrotablo: “Varmigu du tasojn da trinkaĵo kaj alportu unu telereton da huejŝiangfabo. Tion dirinte, li vicigis naŭ moneretojn. Ili intence laŭte kriis: “Certe vi denove ŝtelis.” Large malferminte la okulojn, Kung J. Ĝ. diris: “Kial vi tiel senbaze makulas mian senkulpecon?...” “Kia senkulpeco? Antaŭhieraŭ mi propraokule vidis vin ŝteli librojn de sinjoro Ho kaj pende batatan.” Kaj Kung J. Ĝ. ruĝiĝis, ĉiu blua vejno sur lia frunto ŝvelis, kaj li argumentis: “Ŝteli librojn oni ne povas nomi ŝtelo... ŝteli librojn!... Afero de intelektuloj, ĉu tion oni povas nomi ŝtelo?” Do sekvis vortoj malfacile kompreneblaj, kiel ĝentila sinjoro naturas malriĉecon⁶, kiel *‘ĵe, hu’*, ktp. tiel ke la amaso da homoj ridegis; gaja atmosfero plenigis la internon kaj

³ “kvindek” estas mistraduko de “pli ol dek”. — FR

⁴ *ĵi*: iru al; prep. del.

hu: ĉu? (uzata je la fino de frazo).

ĵe: -isto, -anto, ulo.

ie: esti (uzata je la fino de frazo).

⁵ Tiuj ĉi kvar vortoj estis uzataj en la ĉina klasika lingvo, sed ne en ia vulgara lingvo de l’ ĉina popolo

⁶ Tio signifas: Ĝentila sinjoro opinias, ke malriĉeco estas natura, ordinara, ne mirinda.

eksteron de la trinkejo.

Oni en lia foresto priparolis, ke Kung J. Ĝ. iam studis, sed post ĉio ne sukcesis ‘eniri la lemejon’,⁷ kaj ke li ne estis lerta por perlabori, sekve pli kaj pli malriĉiĝis kaj preskaŭ fariĝis almozulo. Feliĉe li skribis bonajn vortojn, tial li kopiis librojn por aliaj, ke li povu aĉeti pelvon da rizaĵo. Bedaŭrinde, li havis econ malbonan. t. e., ami manĝi kaj malami labori. Li nur sidu ie ajn kelkajn tagojn, kaj homo, kaj libroj, paperoj, skribilo kaj inkpleto — ĉiuj malaperis. Tio okazis kelkfoje, kaj oni ne plu petis lin kopii librojn. Nenion povis fari Kung J. Ĝ., krom fojfoje ŝtelil. Sed en nia trinkejo lia konduto estis pli bona ol tiu de ĉiuj aliaj, ĉar li neniam ŝuldis; kvankam kelkfoje li ne havis monon kontantan kaj lian nomon oni provizore skribis sur tabulon, tamen post malpli ol unu monato li certe ĉion repagis kaj de la tabulo forviŝiĝis la nomo Kung J. Ĝ..

Kiam Kung J. Ĝ. jam trinkis duontason da trinkaĵo kaj lia ruĝiĝinta vizaĝo iom post iom reprenis sian originalan koloron, aliu lin demandis: “Kung J. Ĝ., ĉu vi efektive scipovas legi kaj skribi?” Kung J. Ĝ. rigardante la demandinton, mienis, kvazaŭ li ne volus sin humiligi per argumentado. Ili do daŭrigis: “Kial vi eĉ duona ĵalentulo⁸ ne povas fariĝi?” Kung J. Ĝ. tuj aspektis

⁷ Tio signifas sukcesi je la unua ekzameno kaj eniri urban lernejon dum la tempo de la malnova eduksistemo.

⁸ Lernanto de urba lernejo dum la tempo de la malnova eduksistemo.

dekadenca kaj maltrankvila, lia vizaĝo griziĝis, li ion diris: ĉifoje estis nenio krom *‘ji, hu, ĵe, je, ’ktp.*, nenion oni povis kompreni. Tiam ĉiuj ridegis: gaja atmosfero plenigis la internon kaj eksteron de la trinkejo.

Tiam mi povis ridi kune kun la aliaj, kaj la trinkejestro min certe ne riproĉis. Krome la trinkejestro, vidinte Kung J. Ĝ.-on, ankaŭ ofte lin tiel demandis por fari onin ridi. Kung J. Ĝ. sciis, ke li ne povas konversacii kun ili, sekve li povis alparoli nur infanojn. Foje li diris al mi: “Ĉu vi iam legis?” Mi iomete kapjesis. Li diris: “Vi legis... do mi vin ekzamenu. Kiel vi skribas la vorton ‘hŭej’ en la termino ‘hŭejŝiangfabo?’” Mi pensis, kiel homo simila al almozulo taŭgas por min ekzameni? Sekve mi detumis la vizaĝon kaj ne plu lin respondis. Kung J. Ĝ. atendis longe kaj kompleze diris: “Ne povi skribi?... Mi vin instruu. Memoru! Ĉi tiun vorton oni devus memori. Kiam vi fariĝos trinkejestro, skribante kontlibron vi ĝin uzos.” Mi pensis, ke mi ankoraŭ estas tre malproksima de la rango de estro, kaj cetere nia estro neniam enskribis hŭejŝiangfabon en kontlibron; pensante lin ridinda kaj estante senpacienca, mi malvigle respondis: “Kiu bezonas, ke vi instruu? Ĉu ne estas la vortoĉapo ‘ĉaŭ’⁹ supre, kaj sube la vorto ‘hŭej’, kiu signifas reveni, kiam vi diras, ‘iri kaj reveni?’” Kung J. G. ŝajnis tre gaja, kaj frapetante la montrotablon per du longaj fingrungoj kaj

⁹ signifanta “herbo”.

kapjesante li diris: “Jes, jes!... La vorton ‘hŭej’ oni povas skribi en kvar manieroj, ĉu vi scias?” Mi fariĝis des pli senpacienca kaj elpuŝante la buŝon foriris. Kung J. Ĝ. ĵus trempis sian ungon en trinkaĵon por skribi sur la montrotablo, sed, vidante, ke mi tute ne entuziasmiĝas, li ĝemis kaj aspektis tion bedaŭri.



Kelkfoje najbaraj infanoj, aŭdinte ridadon, ankaŭ alkuris por vidi la scenon kaj ĉirkaŭis Kung J. Ĝ.-on. Li do donis al ili po unu hŭejŝiangfabon. Kiam la infanoj la fabojn jam manĝis, ili ankoraŭ ne disiĝis, sed la telereton fiksrigardis. Kung J. Ĝ. konfuziĝis, etendis siajn kvin fingrojn, kovris la

telereton kaj kliniĝinte diris: “Jam ne multaj, mi jam ne multajn!” Rektiĝinte li denove ekrigardis la fabojn, kaj kapneante diris: “Ne multaj, ne multaj! multaj hu³ zai¹⁰? nemultaj je³!” Do la grupo da infanoj disiĝis ridadante.

Tiamaniere Kung J. Ĝ. faris onin gaja, sed estis tute egale sen li.

Iutage, eble du-tri tagojn antaŭ la Aŭtunmeza Festo, nia estro estis fermanta la konton. Malpendiginte la tabulon, li subite diris: “Kung J. Ĝ jam longe ne venis. Li ankoraŭ ŝuldas deknaŭ moneretojn.” Tiam ankaŭ mi rememoris, ke li efektive jam longe

¹⁰ zai: interj. ekkrio de adimiro aŭ malĝojo: demanda partiklo.

ne venis. Iu trinkanto diris: “Kiel li povus veni?... Lia kruro rompiĝis pro bato.” La trinkejstro diris: “Ha!” “Li ankoraŭ ĉiam ŝtelis. Ĉifoje li tute malsaĝiĝis, eĉ iris priŝteli Elektitulon¹¹ Ting. Ĉu lin oni povas priŝteli?” “Kio poste?” “Kio? Unue li skribis konfeson, poste oni lin batadis dum pli ol duonnokto, ĝis lia kruro rompiĝis.” “Poste?” “Poste lia kruro rompiĝis.” “Kio do, post la rompiĝo de lia kruro?” “Kio?... Kiu scias? Oni diris, ke li mortis.” La estro ne plu demandis, kaj malrapide kalkulis sian konton.

Post la Aŭtunmeza Festo, la aŭtuna vento tago post tago malvarmiĝis, vintro proksimiĝis; tuttage mi restis proksima al fajro. Vatita jako jam estis necesa. Iun posttagmezon ne estis klientoj, kaj mi estis sidanta kun okuloj fermitaj. Subite mi aŭdis voĉon: “Varmigu tason da trinkaĵo.” La voĉo, kvankam mallaŭta, estis orelkonata. Sed, kiam mi serĉrigardis, ja ne estis persono. Stariĝinte mi rigardis eksteren kaj vidis Kung J. Ĝ.-on sidi malsupre de la montrotablo kontraŭ la sojlo. Lia vizaĝo estis nigra kaj malgrasa kaj tute deformiĝis; li portis eluzitan jakon dutavolan, kun kruroj krucitaj, kaj sub si junka sako, pendigita de la ŝultroj per pajloŝnuroj. Vidinte min, li denove diris: “Varmigu tason da trinkaĵo.” La trinkejstro ankaŭ etendis antaŭen sian kapon kaj diris: “Ĉu Kung J. Ĝ.? Vi ankoraŭ ŝuldas

¹¹ ‘Elektitulo’ signifas: ‘talentulon’, kiu sukcesis je la dua ekzameno dum la tempo de la malnova eduksistemo

deknaŭ moneretojn! Suprenrigardante Kung J. Ĝ. tre rompiĝinte respondis: “Tiun... mi tute repagos la venontan fojon. Ĉifoje mi aĉetos kontante. Donu trinkaĵon bonan!” La trinkejestro ankoraŭ same kiel ordinare, diris al li sidante: “Kung. J. Ĝ., vi denove ŝtelis!” Sed ĉifoje li ne multe sin senkulpigis, nur diris mallonge: “Ne ŝerĉu!” “Ŝerci? Se vi ne ŝtelis, kial vian kruron oni batadisĝis rompiĝo?” Kung J. Ĝ. diris mallaŭte: “Ĝi rompiĝis pro falado, pro falado...” Lia rigardo ŝajnis peti la trinkejestron ne plu tion priparoli. Tiam jam ĉirkaŭiĝis kelkaj personoj, kaj ĉiuj ridis. Mi varmigis la trinkaĵon, ĝin portis eksteren kaj metis sur la sojlon. Li elprenis el sia ŝirita poŝo kvar moneretojn kaj metis en mian manon. Mi vidis, ke estas koto sur liaj tutaj manoj, per kiuj li estis ja veninta. Baldaŭ li eltrinkis la trinkaĵon kaj denove, sidante, foriris per manoj, kiam la aliaj paroladis kaj ridadis.



Post tiam, denove longe ni ne vidis Kung J. Ĝ.-on. Je la jarfino, malpendiginte la tabulon, la trinkejestro diris: “Kung J. Ĝ. ankoraŭ ŝuldas deknaŭ moneretojn!” Je la Klaro-Festo¹² de la sekvanta jaro li denove diris: “Kung J. Ĝ. ankoraŭ ŝuldas deknaŭ

¹² La 5-a aŭ 6-a de aprilo.

moneretojn!” Je la Kvinamonata Festo,¹³ tamen, li tion ne diris. Denove Aŭtunmezo, sed Kung J. Ĝ. ne vidiĝis.

Ĝis nun mi lin ne vidis, — eble li efektive mortis.

— Legu aliajn *Novelojn de Lusin* (plena kolekto)

Tri avertaj rakontoj

de Liu Zongyuan (773 – 819) trad. Minosun

Mi ĉiam abomenas tiajn homojn, kiaj, sen koni siajn proprajn malfortaĵojn, paradas nur per alies povo: ili aŭ, apogante sin sur la forto de aliaj, volas havi aferon kun alispeculoj; aŭ, ludante ruzajon, provokas eĉ pli grandajn potenculojn; aŭ, en okazo de favoraj cirkonstancoj, ekstravagance kondutas... ĝis sur ilin plago falos. Foje mia gasto rakontis al mi pri cervo, azeno kaj musoj, kaj iliaj sekvoj similas tiujn de la ĉi-supre menciitaj estuloj. El la rakontoj rezultis “Tri Avertaj”.

11

La cervo en Linjiang

Iam vivis homo en Linjiang. Li eliris ĉasi, kaj kaptis cervidon, kiun breĉis li intencis. Apenaŭ li eniris kun la ĵuskaptito, la ĉashundoj ĉiuj alvenis, bavante kaj svingante siajn vostojn. Pro tio la ĉasisto ekkoleris kaj ilin fortimigis. De tiu tago la

¹³ La kvina tago de la kvina monato de 1' luna kalendaro.

mastro de tempo al tempo proksimigis la cerveton al la hundoj, por ke ili kutimiĝu al ĝi, ne damaĝu ĝin. Pasis iom longa tempo, ili eĉ ludis kun ĝi, kaj kondukis kiel deziris la mastro. Kreskis la cervo, kaj jam forgesis, ke ĝi mem estas cervo. Ĝi prenis la hundojn por veraj amikoj, ludis kun ili, eĉ senskrupule, jen tuŝante ilin per la kornoj, jen sin rulante antaŭ ili. La voruloj, pro la timo al la mastro, tre amikis kun ĝi enlude, tamen ili ankoraŭ ofte lekis siajn lipojn kun manĝavido.

Tri jarojn poste, la cervo eliris, kaj trovis, ke survoje promenas amase da fremdaj hundoj. Ĝi deziris ludi kun ili. Tiuj nekonataj sovaĝuloj vidis ĝin tiel gaje kiel kolere, kaj kune ĝin murdis kaj formanĝis. Dismetiĝis la restintaj ostopecoj ĉie sur la vojo. Sed ĝismorte la cervo ne sciis la kialon.

La azeno en Qian

En Qian propre ne ekzistis azeno, sed iu tieulo perŝipe enkondukis unu en la lokon. Sed, kiam ĝi estis portita tien, la enkondukinto trovis ĝin taŭga por nenio. Li do forĵetis la azenon en montpiedo. Tiam tigro vidis ĝin giganto diosimila, kaj sinkaŝis inter arbustoj por fari observadon. Post kelka tempo ĝi singarde elpaŝis kaj iom proksimiĝis al la giganto, sed efektive ne sciis, kio ĝi estas.

Alian tagon la azeno iais, je kio la tigro terurege forkuris malproksimen, timante, ke la granda besto ĝin mem mordos. Poste ĝi observis foj-refoje kaj rimarkis, ke la azeno havas

neniun specialan povon. La vorulo, iom kutimiĝinte al la iaado, ankoraŭ eĉ pli proksime ĉirkaŭiris la rivalon, tamen tute ne arogis al si lukton kontraŭ ĝi. Al tiu la tigro denove apudiĝis, kun des pli humiliga alpuŝiĝo. La azeno ne eltenis la ofendon kaj batis per la hufo la ofendanton. Ĉe tio la rabobesto ĝojis kaj pensis: “Ĝia povo estas nenio alia ol tio ĉi!” Sekve la tigro blekegante prancis, murdrompis la gorĝon de la azeno, finvoris la karnon, kaj foriris.

Ho ve al la azeno! La korpo gigantas, kvazaŭ kun granda taktiko; la iaado impone sonas, ŝajne kun forta povo. Kvankam la tigro sovaĝas, tamen, se la azeno ne estus malkaŝinte sian malfortecon, ĝi restus timema kaj ne kuraĝus ĝin preni. Vere veindas la okazo!

13

La musoj en Yongzhou

En Yongzhou estis homo (kies nomon mi forgesis), kiu havis grandan timon pri malfeliĉo kaj strikte observis la tabuon pri la tago de naskiĝo. Li naskiĝis en la jaro de la Muso, kiu do por li estis sankta. Kaj sekve li amis musojn, kaj ne brebis katojn kaj hundojn, nek permesis, ke liaj servistoj batu musojn. Ĉie en liaj grenejo kaj kuirejo musoj tiranis ĉion, tamen al tio li neniam donis zorgon.

Tial, la musoj komunikis unuj aliajn, kaj ĉiuj venis en la domon. Tie ili manĝis ĝissate, sendanĝere. En la ĉambroj de tiu homo ne troviĝis eĉ unu perfekta objekto sen detruo: ĉiu el la

vestoj en la ŝrankoj estis difekta, kaj el la manĝaĵoj restis nur tio, kion la musoj postlasis. Tage ili ope promenis kun homoj, nokte ronĝis objektojn kaj luktis unu kun alia - estiĝis tiaj bruoj, ke homoj ne povis endormiĝi. Tamen la mastro ne montris sin malinklina al la musoj.

14 Kelkajn jarojn poste li transloĝiĝis en alian prefektujon, kaj iu alia prenis la domon, sed la musoj kondukis same kiel antaŭe. Tiu diris: “Kiel naŭzas tiuj aĉaj el mallumejo! Kial ili senskrupulas ĝis tia grado?” Li pruntis kvin-ses katojn, kaj faris, ke oni hermetike fermu la pordon, forprenu la tegolojn, enverŝu akvon en la truojn. Kaj plie, li rekompencis siajn servistojn, kiuj de ĉiu flanko ĉasis la musojn. La mortigitajn musojn oni amasigis kiel monteton en la ombra angulo, kie homoj neniam antaŭe estis. La pesta malbonodoro ĉesis nur post kelkaj monatoj.

Ho ve! tiuj musoj opiniis, ke ili povas frandi sate kaj vivi senriske. Sed, ĉu tio povus esti eterna?

Serĉi pretekston por viziti patrinon

Yin Jiabin

En mia aĝo de kvar jaroj, pro malriĉo, la gepatroj adoptigis min al la pli juna onklo, kies familio vivis iomete pli bone ol la mia. Nun, la patro kaj adoptaj gepatroj jam forpasis, la patrino fartas ankoraŭ sane. La patrino volas nek vivi kune

kun mi nek akcepti mian iun ajn helpon, ĉar, laŭ ŝiadiro, ŝi ne vivtenis min dum mia infanaĝo, do ŝi preferas ne ĝeni min nun.


Post sia eksedziĝo, mia pli juna frato loĝis kun la patrino en luita domo, kiu distancas de mia loĝejo je kvar kilometroj. Li laboras tre malproksime, kaj ĉiutage eliras frumatene kaj revenas malfrue. Pro la temperamento de introverto, li malofte interparolas kun la patrino. Do tuj kiam mi estas libera, mi stiras la aŭton por vidi la patrinon kaj babiladi momenton kun ŝi. Estas malfacile paroli kun la patrino, kiu iomete surdas. Mi ĉiam sentas min trankvila tiam, kiam ŝi al mi parolas tro laŭte, ĉar ju pli laŭte ŝi pridemandas tiun kaj ĉi tiun, des pli montriĝas ke ŝi estas sana. Ja estas feliĉo por gefiloj ke sanas gepatroj.

La patrino travivis tre multe da mizeraĵoj, do ŝi neniam konsideras vivan malfacilon kiel malfacilon, ĉiam dirante ke ŝi vivas bone, kaj ŝi ankaŭ ne esprimas sian deziron por la vizito de la gefiloj. Mi scias, ke nur kiam ĉiu familio de la kvar gefiloj restas harmonia kaj paca, la patrino sentas sin kontenta kaj sensoleca, ne atentante kiu venas aŭ ne. Ĉiufoje kiam mi ŝin vizitis, ŝi ĉiam konstatis, ĉu mi venis por iu celo, ripete demandante: “Por kio vi venas?” Ŝi kutime demandis, ĉu mi jam manĝis, eĉ se tiam estis la oka-naŭa horo vespere aŭ la triakvara posttagmeze. Traktante min kiel gaston, ŝi, demandante, intencis elportis al mi manĝaĵojn, kvankam en la kuirejo troviĝis nur plado da kuirita legomo kaj telereto da la vegetaĵo peklita de ŝi. Post kiam mi sciigis al ŝi, ke mi venis por nenio,

ŝi ĉiufoje rigardis min duondube. Ŝi ĉiam interrompis nian interbabiladon per siaj demandoj: “Ĉu vi venas por io?” “Kio okazis al via familio?” “Kiel fartas via edzino?” “Ĉu via filo bonas en la lernejo?” Ŝajnas al ŝi, ke mi iras al ŝi certe por io. Mi finfine komprenas, ke ŝi ne kutimas al mia vizito sencela.

Por forigi el la patrino la senton ke mi vidas ŝin nepre por iu celo, nun, antaŭ ol viziti ŝin, mi serĉas pretekston, kiun ŝi sentas konvena: doni veston al la frato, kontroli lian komputilon, alporti la aĉetitajn legomojn el kamparo, postuli al la patrino la de ŝi peklitan manĝaĵon (efektive mi neniam ŝatas peklitan manĝaĵon) ... Finfine, mi vere ne povas eltrovi novan pretekston.

Troviĝas lignobrula kuirforno en la domo de la patrino.



Pro ŝparemo, ŝi kiel eble plej multe uzas la fornon anstataŭ la fornon de likvigita gaso. Instaligis du novaj klimatiziloj en mia domo, kaj restis eluzitaj pakumaĵoj, kiujn mi donis al la patrino por bruli. Ŝi tre ĝojis, dirante ke mi devas doni al ŝi

bruleblajn eluzitaĵojn, se iam ajn mi havus. Subite mi ekpensis, ke mi povas ŝin viziti de tempo al tempo alportante la bruleblaĵojn. Ekde tiam, mi intence amasigas tiajn eluzitajn bruleblaĵojn, kiaj skatolojn, malnovajn librojn kaj ĵurnalojn

k.t.p. Kiam mi iras al la patrino, mi alportas parton da la kolektaĵoj, sed ne ĉiom, ĉar tiamaniere mi povas la patrino viziti plurfoje.

La Ĉerizoj

Karl Minor

Paŭlo estis enamiĝinta, kaj jam de dek tagoj; de la tago, kiam li alvenis ĉi tie en la banloko kaj unuafoje vidis Erna-n Pagel, la junan, belegan vidvinon.

Pro la malvarma vetero nur tiu ĉi sinjorino, maljuna majoro kun sia edzino, kelkaj nejunaj sinjorinoj kaj Paŭlo estis ĉi tie, kaj, pro neĉeesto de sinjoroj, li ne havis rivalon je la favoro de la ĉarma vidvino.

Jam de kelkaj tagoj li havis la deziron, sciigi al ŝi sian amon; precipe de post kiam li rimarkis, ke de tempo al tempo ŝi sendas varman, ridetantan rigardon al li kaj aminde respondas liajn salutojn. Sed kuraĝo al li mankis. Ĉu estis certe, ke tiuj rigardoj, tiu amindeco ne estis nura kompato? Kompato al li, la malfeliĉulo kun la malagrabla paroldifekto? Jes, certe! Ŝi nur ridetis, ĉar li ne povas elparoli la konsonanton r kaj anstataŭe eligas sonon, por kiu nia lingvo tute ne havas literon, kaj kiun mi devos prezenti per x en la sekvontaj paroloj de Paŭlo.

Ho, kiom ofte tiu difekto jam embarasis lin! Ne nur, ke

fremdulo, kun kiu li parolis, alie aŭ eĉ tute ne komprenis, kion li volis. Ĉar li konscias sian difekton, li eĉ estas tro hontema por paroli kun fremda persono, precipe, se tiu estas juna, amata, bela sinjorino.

Sed tamen li volas al ŝi sciigi sian amon, volas aspiri ŝiajn manon kaj koron kaj al ŝi certigi, ke ĉe lia flanko ŝin atendas bela, „rozkolora“ vivo sanktigata per la sindonemo de viro ŝin amanta.

Kaj morgaŭ jam ŝi veturos hejmen en sian gepatran urbon, en sian domon ne malproksiman de lia loĝejo. Plej malfrue do morgaŭ matene li devos paroli kun ŝi, kaj li havas bonan ideon, kiel aranĝi tion:

18

Hieraŭ li vidis ŝin staranta antaŭ la fenestrego de butikoj de necesaj, kaj diranta al la maljuna fraŭlino, kiu akompanis ŝin:

„Jen, vidu la belegajn, freŝajn ĉerizojn! Kiom alloge ili brilas! Kvazaŭ ili scius, ke mi tiom ŝatas ilin. Sed rigardu, kiam ili estas multekostaj. Domaĝe!”

Plu li ne aŭskultis, sed li eksciis, kiel fari ĝojon al ŝi.

Kaj nun, alveninte en la hotelo, li volas faktigi sian planon.

„Fraŭlino“, li tial diris al la ĉambristino. „Morgaŭ plej frue, aĉetu kelkajn bonajn, ruĝajn ĉerizojn — jen en la butikoj de necesaj — kaj tuj ilin portu al sinjorino Pagel, kun saluto de mi.“



Li donis al ŝi pli ol sufiĉantan monsumon. La ĉambristino ridetaĉis kaj foriris, kaj Paŭlo enlitiĝis. Longtempe li sin ĵetis de unu flanko sur la alian, kaj kiam fine li ekdormis, li, en sonĝo, sin vidis staranta antaŭ Erna, kiu ridetante al li premis manon. Li volis paroli kaj ne povis. Malvarma ŝvito ekaperis sur lia frunto, kaj li — ekvekiĝis.

„Dank’ al Dio!“ li pensis. „Sonĝo teruras, sonĝo forkuras! Espereble ĉio bone funkcios; eble mi povos paroli. Sed certe al mi estas necese, antaŭe iomete promeni en la freŝa aero.“

Kaj kvankam estis ankoraŭ tre frue, li ellitiĝis, kaj, enpuŝante la kapon en la malvarman akvon de sia lavovazo, li forpelis la malagrablajn pensojn.

Li preskaŭ finis sian tualeton, kiam la ĉambristino frapis la pordon, por veki lin kiel kutime.

„Nu?“ li demandis, „ĉu vi aĉetis la ĉerizojn?“

„Jes!“ ŝi respondis: „Ili estas bele ruĝaj kiel la sango de la porko hieraŭ buĉita; kaj mi ilin jam suprensendis. Ili estis la lastaj, kaj pro tio la vendisto al mi kundonis la skatolon: belan, brunan, kartonan skatolon.“ Kaj ŝi malproksimiĝis.

„Belan, brunan, kartonan skatolon?“ pensis Paŭlo, kiam ŝi forestis. „De post kiam ĉerizoj estas vendataj en bruna, kartona skatolo, anstataŭ en papera korbeto?“

La cerbumado lin ekscitis, kaj li ja bezonis sian kalmecon.

En la malvarma matenaero de la hotela ĝardeno li pasigis la tempon, ĝis kiam al li ŝajnis dece, fari viziton al sinjorino

Pagel.

La ĉambristino lin anoncis; kaj kiam ŝi revenis kun la vortoj „sinjorina moŝto vin petas ...!“ li suprenkuris la ŝtuparon. Kun feliĉa rideto sur la lipoj li eniris la ĉambron de la vidvino, sed tuj li rimarkis, ke li ekpaliĝas: la vidvino, al kiu li kredis esti farinta ĝojon, kuris al li renkonte kun furioza vizaĝo, kaj kriante „sinjoro, kion vi arogis fari?!“ ŝi ĵetis antaŭ liajn piedojn skatolon belan, brunan, kartonan.

Senkonscie Paŭlo kliniĝis, kaj forpreninte la kovrilon de la skatolo, li ekvidis fajroruĝajn — porvirinajn ĉemizojn!

20

Nur „pardonu!“ li povis balbuti. Poste li elkuregis kaj malsuprenrapidis la ŝtuparon, ĉe kies fino staris la klera ĉambristino.

Al ŝiaj piedoj flugis la skatolo, kaj nenion al ŝi dirinte, Paŭlo kuris al la butikoj por aĉeti kelkajn funtojn da ĉerizoj, kiujn li tuj alportis al Erna.

„Ŝatata sinjorino!“ li diris, ilin donante, „Tion al vi donas junulo, kiu venis ĉi tien kun la intenco, sciigi al vi siajn sentojn, kaj vin peti, kunligi vian vivon kun la lia. Mi volas agi ĉiel, por feliĉigi vin tiel longe, kiel vi vivos ĉe mia flanko!“

Flue la vortoj venis de sur liaj lipoj, ĉar li sukcesis esprimi siajn pensojn per frazo enhavanta nur du r-sonojn. Kvankam lia parolo ne estis modelo retorika, ŝi tamen komprenis, kion li celis.

„Sinjoro“, ŝi respondis ridetante kaj al li etendis manon. „Tro rapide ĉio ĉi okazis. Ne tuj mi povas respondi, sed se poste,

kiam mi estos en la trajno, vi revidos unu el viaj bonegaj ĉerizoj, vi rajtas esperi kaj min viziti, kiam vi revenis hejmen. Sed nur, se vi revidos unu el la ĉerizoj!“

Li foriris; kaj terure malrapide por li pasis la horoj.

Fine li staris sur la perono kaj vidis Erna-n, kiu staris ĉe la fenestro de sia kupeo.

Ŝi ŝajne ne vidis lin kaj konstante rigardis en la malan direkton. Kaj li ne kuraĝis alproksimiĝi.

Jam komencis moviĝi la vagonaro, kaj ankoraŭ ŝi ŝajnis ne vidi lin.

Sed jen! Mallaŭtan krieton Paŭlo eligis, ĉar varme ŝia rigardo subite turniĝis al li, dum kiam en sian malgrandan buŝon ŝi ŝovis bonegan, ruĝan ĉerizon.

21

La vivo de Peĉjo

ŝercoj • Timothy BORONCZYK



Teksto kaj ideo de Timoteo; desegnaĵoj de "Awesome Satyr". (Kaŝnomo, kompreneble. Timoteo klarigas, ke la artisto preferas resti anonima.)

Viruso

Maurizio GIACOMETTO

La prezidento kunsidis kun la plej altrangaj kuracistoj.

Estis urĝe decidende kiel pritrakti viruson, kiu disvastiĝis en urbeto meze de la lando.

22 Ĉu sciigi novaĝagentejojn? “Diru sincere – kiaj estas la danĝeroj de tiu abomeninda viruso?” La ĉefkuracisto apenaŭ kuraĝis respondi. “Ĝi transmisiigās dum renkontiĝoj, kiam infektita homo ekparolas ian strangan lingvon. Ĝi iradas de homo al homo, ne bezonante kontakton.” “Post tia babilado, ne plu eblas haltigi tiun lingvaĉon – pardonon – viruson.” “Diable. Se tiu viruso venkos nin, la mondo falos en kompletan ĥaoson. Baldaŭ ne plu estos muroj inter la homoj.”

Oni ne sciigis novaĝagentejojn. Por savi la mondon – kompreneble.

—*Usona Esperantisto 1/2021*

“Ho, mia kor’!”

Donald Jacob UITVLUGT

Mi amis ŝin. Tio estas certa.

Tio devas esti certa, aŭ mi freneziĝos.

Fojfoje ni kverelis.

Kompreneble. Ĉiu paro kvereletas. Tio signifas nenion. Tio signifas nur, ke ni ambaŭ estis emocio-riĉaj homoj. Neniam mi povis dolorigi ŝin, nek ŝi min.

Do ne estis ŝi, kiu priridis min en la ĝardeno. Ne estis mi, kiu havis tranĉilon ĉemane. Ne estis ŝi, kies sango ekfloris kiel rozoj. Ne estis mi, kiu mortigis ŝin.

Tio estas aĉa mensogo.

Tamen nun la dratoj de la mensogdetektilo premas sin kontraŭ mia frunto. Mia amo premas sin kontraŭ mia koro.

Ne batu maltrankvile.

Ne batu.

Ne ...

—Usona Esperantisto 1/2021

23



Blanka dezerto, la kampoj senfinaj,

Neĝebenaĵoj sub suno brilantaj...

Trupe ni iras, junuloj, knabinoj,

Skiojn facile kaj gaje movantaj.

For de l'urbego al freŝa aero,

A1 malproksima, malluma arbaro!

Suna, malvarma, saniga vetero

Donas humoron al tuta anaro.

Eĥe disiĝas la ŝercoj kaj ridoj,

Ĝojaj babiloj kaj opa kantado;

Ĉien rigardu—similaj la vidoj,

Ĉiun gajigis la skia kurado.

Griza arbaro la pacon deziras,

Klinas malpezan branĉaron neĝplenan;

Arboj kviete kaj sonĝe nun spiras,

Tute ne volas montriĝi bonvenon.

Branĉojn neĝplenajn ni gaje tremigas;

Neĝo defalas amase, nebule;

Tio pli forte anaron gajigas,

Ĉiu amuzas sin laŭte, junule.

Venas ni brue al morta rivero,

Al la krutaĵoj, deklivoj logantaj,

Kie dum varma pasinta somero

Kreskis floretoj bonodorantaj.

Tra la deklivoj nin portas la skioj;

Freŝa aero piketas vizaĝon;

La kunulinoj kun rido kaj krioj

Montras, tremante, koketan kuraĝon.

Vento iliajn vangetojn rozigas;

Laŭdas ni ĉiuj la vintron malvarman;

Sporto, juneco nin forte kunigas,

Donas senĉesan feliĉon kaj ĉarmon.

Poemoj de Hsŭ Tzi Mo

trad. *Saint Jules Zee*

Kanteto de falanta folio

Aŭdiĝas sur la trotuar' paŝbru',
(Proksimas jam la sonĝolando;) ĉu
Estas la ŝia? Certe ja, mi pensas.
En tia noktmalfru'!

Sur la fenestro jen iu frapetas,
(Mi jam tuj apud la sonĝlando estas;)
Certe ŝi volas min surprizi, . . . vidu.
Mi tamen kvieta restas.

Ĉe la litkapo eksusuro krepa,
Mi diras (duondorma, duonreva:)
“Neniam vi komprenos min, do kial
Igadi min korkreva!”



Ĝemspiro ĉe la kapkusen' murmuras,
(La sonĝolanda sorĉo min eklulas;)
“Mi vin neglektis!” kaj de ŝiaj larmoj
Jam vangoj miaj brulas.

Je l' voĉo ĉagreniĝas mia koro,
(Folioj dancas en la kort' en horo;)
Finiĝis sonĝo; kaj la ĉagrenanto...
Nur la aŭtuna ploro!

Li timas, ke oni eldiros

(Amiko, mi komprenas, tiu ĝena osto,
Netolerebla, ĉu ne? ... gorĝo kompatinda!)
“Vidu, sur la herbero kaŭras jen lokusto;
Vent' inter pinoj fajfas kiel liuto tinta.”

26 (Amik' , okuloj viaj, mi ja vidas klare.
Trembrilas de kristalaj larmoj el la koro;)
“Vidu, du papilioj tieflirtas pare,
Kaj flaru la odoron dolĉan de l' violo!

(Amiko, via koro batas maltrankvile,
Sed, sciu, mia ja ne estas pli kvieta;)
“Vidu, jen paro de ge-ĉielarkoj¹⁴brile
Montras sin sur zenito, ... tre koketa.

(Ne estas ŝerco, ja pli bonas ne eldiri,
Vian animsekreton povas mi trasenti;

¹⁴ Laŭ ĉina popolkredo, ĉielarko estas vira aŭ ina. (Rimarko de la tradukinto.)

Mortvundos tiu vort', vi devas konsideri,
Do kial riski blinde kaj ĝin poste penti!)

(Ĉar mi ne volas, ke suferu vi en flam',
Ankaŭ mi... ankaŭ mi mem ne suferi volas.)
"Vidu, la ĉielarkoj nun disfluis jam,
Kaj ne plu papiloj sur herboj' petolas."

(Retenu vin! la Belo... nur burĝon'tenera,
Kial ĝin malheliĝi per nuanc' de zorgo?)
"Ni iru, jam mallumas la ĉiel' vespera, —
Por vidi la matenruĝon ni revenos morgaŭ."

Literatura Mondo 1/1937

27

La „uloj“ en Esperantujo

Ŝerca babilaĵo

„Honny soit qui mal y pensel“ (Honton al tiu, kiu malicepensas pri tio.)

Esperantujo estas la plej granda el ĉiuj landoj; ĉar ĝi etendas sin sur la tutan teron.

Ĝiaj enloĝantoj, la Esperantistoj aŭ Esperantanoj, apartenas preskaŭ al ĉiuj raso; tamen ili havas la saman volon, la saman celon. Pro tio ili nomas sin gefratoj. Sed kiel en la ĉiutaga vivo la fratoj kaj fratinoj havas malsamajn emojn kaj karakterojn, tiel estas ankaŭ en Esperantujo. Iom post iom estiĝis kaj estiĝas

apartaj tipoj, kiuj estas troveblaj ĉie, kie loĝas Esperantanoj. Tiaj tipoj estas la „uloj“ en Esperantujo.

La *eminentuloj* naĝas kiel „grasokuloj“ sur la Esperanta buljono. Sed bedaŭrinde nur malofte ili estas videblaj. Ili sidas sur sia alta trono, de sur kiu ili, anstataŭante nian karan Majstron, regas serioze pri la tuta Esperantistaro. Se ili estas vokataj, ili aperas kun granda sekvantaro (ne elektita, sed altrudinta sin al ili), parolas kun rokfirma konvinko kaj orakolas pri la fina venko de nia sankta afero.

28

Ni ekgenuu kaj preĝu al la ĉiupova Dio: „Ŝirmu niajn eminentulojn, la stelojn sur la Esperanta ĉielo!“ La *laboremuloj* kaj *agemuloj* estas la granda multo de tiuj Esperantistoj, kiuj efikas kiel estroj, sekretarioj, kasistoj ktp. en la grupoj kaj gruparoj. Neniu povas pretendi, ke ili estas enviindaj homoj. Ili brilas pro fiero kaj ĝojo, se oni gloras ilin kaj aplaŭdas pro iliaj faroj. Sed se mankas gloro kaj aplaŭdo, ili forlasas sian pozicion kaj koleretas en iu kaŝa angulo de Esperantujo, ĝis kiam oni alvokos ilin al nova gloro. Ni ne forgesu apartan kategorion de la laboremuloj, nome tiujn, kiuj kviete kaj diligente instruas en kursoj. Pri ili neniu parolas; oni nur konstatas, kun kiom da lernantoj ilia kurso komenciĝis kaj kun kiom da restantoj ĝi finiĝis. Tamen ili estas kontentaj; ili estas la veraj *modestuloj* kaj estas necesaj por Esperanto kiel la ĉiutaga pano por ĉiu homo.

La *propagandemuloj* estas ankaŭ tre necesaj por nia movado, sed ofte tre danĝeraj por la aliaj civitanoj de la mondo.

Ofte ili ĵetegas sin kun alten tenita verda stelo kiel krabroj sur sian viktimon, prilaboras kaj turmentas ĝin, ĝis kiam ĉi tiu krias: „Neniam mi lernos Esperanton!“

Jam tre grandnombra estas la kategorio de la *logikemuloj*, *kritikemuloj* kaj *harfendemuloj*.¹⁵

Domaĝe, ke Esperanto jam estis elpensita, kiam ili naskiĝis. Se ili estus kreintaj nian lingvon, jam la suĉinfano en la lulilo povus paroli ĝin. Eĉ la plej saĝa lingvisto estus devigata, renversi sian tutan logikon por kompreni la lingvon de la ĵus nomitaj uloj. Antaŭ ili Zamenhof estas mizera, noktkandelo. Ido neniam estus estiĝinta. Ĉie, kie ili aperas, ekestas la plej vigla vivo: Ĉiu ekprenas siajn librojn, sian ĉapelon kaj mantelon kaj forlasas la lokon de la teruro. Se ili, la uloj, estas solaj, komenciĝas kruela laboro. Nia kara lingvo kuŝas kiel nuda virino sur la tablo kaj mortas sub la senkompata tranĉilo de la disputantoj. Baldaŭ la kadavro ne plu estas videbla pro la amaso da pensosplitaj kaj fenditaj haroj, kiuj kovras ĝin. Se ĉi tiuj uloj ekvidas Esperantan tekston, ili tuj elpoŝigas grandan mikroskopon kaj esploras vorton post vorto, por trovi la plej malgrandan tekston, je kiu ili povas alkroĉi siajn emojn. La kritik-, logik- kaj harfendemuloj estas la ezokoj en la karpolageto. Ni ĉiutage preĝu: „Dio savu nin de la malbono!“ Ofte identaj al la laste nomitaj uloj estas la

¹⁵ La Germanaj Esperantistoj diras: „Haarspalt-omuloj“.

ŝanĝemuloj. Se ili ne sukcesas altrudi al la Esperantistaro siajn ŝanĝoproponojn, ili transiras al la Idistoj: Bonan vojaĝon! Fartu bone!

La *ekzamenfaremuloj* estas specialaĵo, kies nombro kreskas kun la nombro de la ekzamenkomisionoj. Ĉiam kaj ĉie, kiam kaj kie oni pritraktas Esperantajn temojn, ili elpoŝigas paperon kaj kraĵonon kaj notas ĉiun novan esprimon, ĉiun novan vortkunmetaĵon, ĉiun novan regulon kaj escepton, kiujn la logik-, kritik- kaj harfendemuloj eltrovis. Ili aĉetas ĉiun novan libron, ili legas ĉiun Esperantan gazeton kaj estas pro tio la ĝojo por la eldonantoj de Esperanta literaturo. Ili vizitas ĉiun kurson, ĉu historian, ĉu pedagogian, ĉu stilistikan; ili ĉeestas ĉiun paroladon, kaj ĉe tio ilia tuta korpo estas nur granda orelo. Ili nur revas kaj sonĝas pri la momento, en kiu el la ekzamenfaremulo fariĝas ekzamenito: *fierulo*, kiu nun migras tra Esperantujo kiel „la cikonio en la salato“. Baldaŭ la iamaj ekzamenfaremuloj fondos grupojn de ekzamenitoj, kaj ĉi tiuj grupoj postulos de la „Esperantaj Institutoj“ la rajton, porti verdan stelon kun kvinpintaj, seppintaj kaj naŭpintaj kronoj laŭ speco aŭ nombro de la ekzamenoj, kiujn ili faris. — Do, ve al vi, ekzamenfaremuloj, se vi falas en la manojn de harfendemula ekzamenanto, kun granda bruado vi „falos tra la ekzameno“!¹⁶ Paralele al la ekzamenfaremuloj estiĝas la *ekzamenkontraŭuloj*,

¹⁶ Germanismo = vi malsukcesos en la ekzamenon.

kiuj paŝastra Esperantujo kiel la leono tra la dezerto. Ĉiun, kiu scivoleme demandas ilin, ĉu ili ankaŭ faros ekzamenon, ili terenbatas per la vortoj: „Vi malsaĝulo (evidenta ofendo; ĉar en Esperantujo nepre ne ekzistas tia speco de uloj), mi mem scias sufiĉe bone, kion mi scias aŭ ne. Mi ne bezonas, ke iu atestu miajn mankojn je gramatiko, stilo kaj Esperanto-historio ktp. Mi uzas nian lingvon laŭ mia propra beko; la ĉefaĵo estas, ke ĉiu komprenas min.“Mi preskaŭ estus forgesinta la *grupfondemulojn*; sed ĉar ĉiu Esperantisto sufiĉe bone konas ĉi tiun kategorion, mi aparte ne karakterizos ĝin.

Kiu konas pliajn „ulojn“ en Esperantujo?

Modestulo

31



Pli bonas fari sola

Homoj en sanaj rilatoj vivas pli longe, spertas malpli da streĉo kaj sentas sin pli bone. Sed por ke la feliĉo de vi ambaŭ daŭru eterne, gravas ekvilibri inter disvolvi vian rilaton kaj subteni iom da persona sendependeco. Estas situacioj, kiam apartaj libertempaj agadoj utilos al vi ambaŭ.

Vizitoj al parencoj



32

Ofte, komunaj familiaj festoj kaj kunvenoj fariĝas vera min-kampo: finfine ĉiu familio havas sian propran historion, siajn proprajn kulturajn trajtojn, siajn proprajn manierojn de komunikado kaj manifestojn de amo. Ĉi tio tute ne igas parencojn – de vi aŭ via kunulo - bonaj aŭ malbonaj. Nur parolu honeste pri kiaj familiaj eventoj vi ŝatus ĉeesti kune, kaj kiam estas pli bone por vi viziti parencojn sole.

Ŝatokupo

Ni komprenu, ke ne ĉiuj ŝatas la arton kreskigi bonsajojn aŭ interesiĝas pri sportaj matĉoj. Ni ĉiuj estas malsamaj. Kaj eĉ se temas pri rilato de animoj, ni eble ŝatos tute malsamajn aferojn kaj agadojn. Donu unu al la alia ĉambron, spacon, tempon por

fari tion, kio alportas ĝojon. Vi miros, kiel bele estos vidi vin post iom da disiĝo kaj dividi viajn sukcesojn kaj bonhumoron.



33

Hejme sola



Ĉi tiuj ŝtelitaj momentoj de soleco povas esti vera savo en niaj movaj tempoj. Vi povas spekti trankvile vian plej ŝatatan televidelsendon, kaj neniu vin mokos sarkasme. Vi povas simple sidi silente, aŭskulti vian plej ŝatatan muzikon, legi libron, promeni tra la domo en unu subvesto kun masko sur la vizaĝo. Ĉi tiu sento de spaco, en kiu vi estas sola kun vi mem, povas resaniĝi post okupata ĉiutaga vivo. Ĉiuj bezonas ĝin kelkfoje.

Renkontiĝoj kun amikoj

Bonege, ke vi havas komunajn amikojn, kun kiuj vi ambaŭ amas pasigi tempon. Sed estas multe da diskutado kun maljunaj samlernejanaj aŭ plej bonaj amikoj, kiam vi ridas ĝis larmoj pro komunaj memoroj aŭ klaĉoj pri virinoj. La "solaj eliroj" de via amanto ankaŭ helpas malpezigi streĉon. Do ne ofendiĝu, se via kunulo prenas tempon por renkontiĝi kun siaj amikoj.

34



Butikumado



35

Butikumi estas ne nur amuza, sed ankaŭ sufiĉe elĉerpa. Estas logike, ke vi eble tute ne interesas iri kun via edzo al la sekcio de fiŝkaptaj iloj, kaj al li al vestaj butikoj. Se vi ne estas du fervoraj aĉetemuloj, kiuj ne povas imagi aĉetojn aparte, tiam estas pli bone pasigi ĉi tiun tempon sola. Escepto povas esti vojaĝo por manĝaĵoj - pli bone estas konfidi pezajn sakojn al la pli forta sekso.

Spirita disvolvigo

Jes, ĉi tio povas esti malfacila temo. Sed se estas respekto en la familio, vi kaj via kunulo rajtas havi malsamajn valorojn kaj kredojn. Iuj momentoj plej bone estas farataj solaj - meditoj, spiritaj praktikoj aŭ irado al la templo.



36

Eliroj

Partneroj ofte havas malsamajn psikotipojn kaj temperamentojn, kvazaŭ kompletigante unu la alian. Foje ĉi tio ankaŭ influas socian vivon. Ŝi eble amas eliri (ekzemple al la teatro), kaj li



volonte restos hejme rigardante sian plej ŝatatan kanalon kaj kun kato ĉe sia flanko. Kaj tio estas en ordo. Se vi ambaŭ komprenas, ke tio estas nur afero por plenumi individuajn bezonojn, tiam malstreĉiĝu. Sendube estos kialoj por pasigi tempon kune. La ĉefa afero estas trovi kompromison.

Bela rideto kaj taŭga dentopurigado

Belaj dentoj - pli ol 70% de knabinoj revas pri ili, ĉar ĉi tio estas la beleco de via rideto, kaj brila kaj gaja rideto ornamas vian vizaĝon. Kaj virina rideto estas iafoje ŝia armilo, cetere la plej premlena. Tamen belaj blankaj dentoj estas ne nur beleco, sed ankaŭ indikilo de sano, normala funkciado de internaj organoj. De kie vi devas komenci?

Sendube kun la ĝusta lavado de viaj dentoj. Kiom da tempo vi pasigas por lavi viajn dentojn? La rapideco de la jarcento, en kiu ni vivas,

ne permesas al multaj el ni fari ĉion kun maksimuma zorgo, kaj tial multaj el ni brosas niajn dentojn en



30-45 sekundoj. Ĉi tio estas oh-oh-tre malmulte. Ideale vi devas brosi viajn dentojn dum 2 ĝis 5 minutoj. Ĝuste dum ĉi tiu tempo la pasto plenumos siajn utilajn funkciojn - ĝi havos tempon formi filmon, kiu protektas la emajlon kaj protektas kontraŭ bakterioj, kiuj kaŭzas kariojn kaj aliajn malsanojn.

Kiom ofte vi devas lavi viajn dentojn? Almenaŭ dufoje (matene kaj vespere), kaj necesas purigi ne antaŭ manĝoj, sed post. Ĉu vi lavas vian tason post trinkado de kafo kaj lasas ĝin pura ĝis la venonta fojo? La plej bona eblo estas brosi viajn dentojn post ĉiu manĝo. Ĉi tio okazas tri al kvar fojojn tage. Se vi manĝos, kiel pomon aŭ frandaĵon, vi povas limigi vin al lavado.

Dentistoj daŭre memorigas nin brosi niajn dentojn post ĉiu manĝo, kaj ĉi tio estos praktika okazo por teni niajn dentojn sanaj. Multaj el ni brosas niajn dentojn per horizontala, reciproka movado. Tamen plakedo¹⁷ estas forigita bone se la movoj iras de la gingivo al la dentopintoj, tio estas "balaaj" movadoj, kaj de la ekstero kaj de la interno de la dentoj.

Ne forgesu brosi la maĉan surfacon de la molaroj. Brosi viajn dentojn devas esti kompletigita per maĉgumo. Uzante puran kaj malsekan dentobroson, masaĝu unue la supran kaj poste la malsuprajn gingivojn per cirkla movado.

La kvalito brosi viajn dentojn ankaŭ dependas de la ĝusta

¹⁷ Glueca kuŝejo sur dentoj, en kiu bakterioj multiĝas.

broso. Pli bone estas elekti penikojn kun sintezaj haregoj de meza malmoleco aŭ molaj. Ĉi tiuj penikoj ne vundas la gingivojn kaj dentajn emajlojn. Brosoj kun naturaj haregoj havas tubforman strukturon, tial mikroboj iom post iom amasiĝas en la kavaĵo de ĉiu haro, kaj pro tio, evidente ne estos avantaĝo por ĉiuj.



La idealaj haregoj estas densa kaj densa medicina poliestero.¹⁸ La plej bona formo de la peniko estas kun malgranda kapo kaj kurba tenilo. Estas oportune purigi per tia peniko eĉ en la plej neatingeblaj lokoj. Flekseblaj tenilaj brosoj ofte havas grandajn kapojn, kio nur pliigas la kvanton de dentopasto, sed ne la kvaliton brosi viajn dentojn. Efektive, por grandaj kapoj, aliro al sekretaj lokoj de la buŝa kavo estas signife limigita. Fleksebleco pli gravas por la haregoj ol la tenilo.

La peniko devas esti ŝanĝita unufoje monate. Por aldona purigado de dentoj, iuj dentistoj rekomendas uzi specialan silkfadenon - fadenon. Tamen multaj aliaj dentistoj argumentas, ke ĝi devas esti uzata malofte - nur en ekstremaj kazoj (forigu la restantajn manĝaĵojn, kiuj ne povus esti forigitaj per regula broso).

¹⁸ Polimero, ordinare heteropolimero, ricevita el la kondensado de glikoloj aŭ similaj polialkoholoj.

Ĉu elektraj dentobrosoj bonas? Dependas de vi. Sed vi devas scii, ke ĉi tiuj penikoj faras cirklaĵn movojn, male al la rekomenditaj - de la gingivo ĝis la dentopintoj. Ekzistas ankaŭ sonaj penikoj superaj al elektraj. Tamen ni lasos la respondojn al ĉi tiuj demandoj por la sekva fojo.



40

Kio estos via rideto - vi decidus. Ridetante en juneco, plej ofte parto de supraj dentoj estas elmontrita, en mezaĝo - preskaŭ ĉiuj antaŭaj dentoj, kaj en maljuneco, pro la malleviĝo de la muskola histo de la vizaĝo, rideto falas al la malsupra vico de dentoj. Ekzistas aliaj, pure kosmetikaj kaj fiziologiaj ecoj, sed ĉi tio estas de la kampo de profesia estetika dentokuracado, kiu hodiaŭ povas helpi en multaj situacioj.

Proverboj kreitaj de Minosun

Al silenta homo ne apartenas brua nomo.
Bona efiko venas el apliko.
Hantas “min” ne fantomo, sed homo.
Korpe malfragila, mense debila.
Azeno kalcitras, kreteno arbitras.
Aŭ vivi flore, aŭ morti glore.

Klasika pizosupo

Klasika pizosupo estas preparita kun aldono de fumitaj viandoj. Tiucele oni uzas fumitajn ripojn, bruston, fumitan kolbason.



41

*akvo 3 l
disigitaj pizoj 200 g
terpomoj 3 pecoj
cepo 1bulbo
karoto 1 porcio
fumita kolbaso 500 g
laŭraj folioj 3 folioj
nigraj piprograjnoj 10 grajnoj
sekigitaj herboj 10 g
salo, spicoj al gusto*



Kalorioj: 66 kcal

Proteinoj: 4,4 g

Graso: 2,4 g

Karbonhidratoj: 8,9 g

Verŝu pizojn kun akvo kaj trempu en pura likvaĵo dum almenaŭ 3 horoj, prefere dum la nokto. Rezulte, ĝi kuiras pli rapide kaj donos nuksan guston.

42

Verŝu tri litrojn da akvo en malgrandan ujon, aldonu streĉitajn pizojn kaj surmetu la kuirplaton. Kuiru al meza fajro dum almenaŭ 45 minutoj. Kirlu la enhavon de tempo al tempo.

Muelu fumitajn viandojn. Mi konsilas al vi tranĉi la kolbason en malgrandajn kubetojn kaj sendi ĝin al la pizoj.

Dishaku la cepon kaj karoton en striojn, fritu en oleo kun aldono de salo, viaj plej ŝatataj spicadoj kaj herboj. Kovru la kaserolon per kovrilo kaj kuiru la legomojn dum 20 minutoj.

Tranĉu terpomojn en moderajn kubetojn, sendu al kaserolo kun kuiritaj legomoj. Restas miksi, aldoni iom da piprogramoj kaj kelkajn laŭrajn foliojn. Post kvin minutoj, malŝaltu la fajron kaj transdonu la legomojn al kaserolo.

Antaŭ ol servi, la supo devas esti iomete plenigita. Kune kun la supujo, ne malutilos meti teleron da kruĉoj sur la tablon.

La mondo ridas...

Aŭdiencia interparolado

SinJORino de Brissac, kiu estis tre malbonaŭda, estis prezentota al Napoleono. Ŝi timis pri la paroloj, kiujn la imperiestro estos direktanta al ŝi, kaj dezirante kaŝi sian malbonaŭdon, ŝi jam antaŭe informis sin, kiujn demandojn la imperiestro kutime faris en tiaj aŭdiencoj.

Ŝi eksciis, ke Napoleono regule demandis pri la hejma departemento, pri la aĝo kaj pri la nombro da infanoj. Iom trankviliĝinte sinJORino de Brissac aperis en granda tualetto en la aŭdienco kaj faris siajn tri riverencojn. „Ĉu via edzo ne estis la frato de tiu duko de Brissac mortigita la 21an de septembro? ” demandis la imperiestro rapide. „Ĉu vi ne heredis liajn bienojn? ”

43

Ridetante ŝi respondis:

„Departemento Seinekaj Oise, via imperiestra moŝto.”

Napoleono ekrigardis kaj pludemandis:

„Ĉu vi havas infanojn, sinJORino? ”

„Kvindek du”, estis la respondo.

Napoleono nun ekkonis ŝian malsanon kaj sin turnis senplue al la sekvanta sinJORino, pri kiu li sciis, ke ŝi estas la patrino de multaj infanoj, demandante:

„Kiam vi donacos al via edzo la dekkvinan infanon? ”

La sinJORino, kiu estis aŭskultinta la interparolon kun sinJORino de Brissac kaj kiu tute konfuziĝis pro la malĝentila demando de la imperiestro, respondis embarasite per la kutima frazo:

„Laŭ ordono de via imperiestra moŝto. ”

La forgesita ŝtelisto

Diderot observis, ke la junulo, kiun li protektis, priŝtelis lin kaj aliajn. Li riproĉis la junulon pro lia konduto, sed sen sukceso.

Fine Diderot konsilis al li, vojaĝi eksterlanden. La konsilo estis plenumata, la ŝtelinto ne plu vidiĝis. Post dek jaroj — Diderot jam estis forgesinta la aferon — la sonorilo forte eksonis.

Li mem malfermas la pordon. Antaŭ li staras la forgesita ŝtelisto. Diderot rekonas lin, kiun li opinias delonge pendigita, kaj krias mirigite: „Kiel? Ĉu estas eble?”

„Jes”, rediras la alia, „ne multe mankis.”

44

Deziro de edzino

John Dryden edziĝis kun Elizabeth naskiĝinta Howard. Sed li tiom okupadis sin pri siaj libroj, ke pro ili li malatentis sian edzinon.

Tiu ĉi plendis pro tio pli ol unu fojon, kaj iutage ŝi diris tute malesperigite al sia edzo:

„Mi deziras, ke mi estu libro, tiukaze vi atentus min iom pli ol nun!”

„Jes, mia kara”, respondis Dryden, „kalendaro; mi plene konsentas.”

„Kalendaro? Kial ĝuste kalendaro?”

„Ĉar tiukaze mi ciujare ricevus novan!”

Komplimenta mallaŭdo

Ludoviko XIVa iam verkis poemon.

Li transdonis ĝin al Boileau, ne dirante ion pri ĝi.

En sia memfido li neniel pensis, ke la poeto ne laŭdus ĝin senmezure.

Boileau tralegis ĝin kaj poste plenadmire diris: „A1 via reĝa moŝto nenio estas malebla! Vi bonvolis fari malbonan poemon, kaj en tio vi admirinde sukcesis. ”

Knabino malĝojas

En lernejo la instruistino dris al siaj lernantinoj: “Nun ni volas ekzerci desegnadon. Ĉiu el vi liveru al mi desegnaĵon, sian estontan profesion montrantan.” Post unu horo la instruistino kontrolis la laborojn. Unu el la knabinoj desegnis robon kiel estonta tajlorino, la alia kuleron kiel kuiristino, aŭ gladilon, ĉapelon k.t.p. Nur unu folio restis pura. “Nun, kial vi estas nenion desegninta?” demandis la instruistino la knabinon. Ekplorinte la malgrandulino respondis: “Mi volas nur edziniĝi, sed mi ne scias kiel tion estumi desegnanta.

45

Malfeliĉa en la amo

A: Eĉ ĉio mi sukcesis, nur en la amo mi estis malfeliĉa...

B: Kial...

A: Mia unuafianĉino fariĝis monaĥino, la dua baldaŭ mortis, la tria dronis, kaj la kvara, ho ve, estas mia edzino!

La efiko de l' nomo

Instruisto: He, vi, grandorela bubaĉo, straba besto, tie en la kvara benko! Kion vi faraĉas? Vi senordaĉas, vi fikondutas, vi fuŝas. Kial vi ne lasas trankvila cian najbaron? Kial vi ĝenas lin? Kial vi puŝas lin? Mi vin orelon-tiros kaj elĵetos, vin, malbona infano! Alvenu ĉi tien, antaŭ min... Kiel vi nomas?

Infano (per timema voĉo): Johan Morgan.

Instruisto (per treafabla voĉo): Kiel? Morgan? Vi estas filo de famafirmestro Morgan? Bonvolu, mia kara amiketo, transdoni al via patra moŝto mian plej respektoplenan saluton.

46

Ruzulo

Du komercistoj procedis unu kontraŭ la alia. Unu demandis sian advokaton: “Ĉu vi ne opinias, ke mi sendu gransan anseron al la jugisto?” “Kion vi pensas,” respondis la advokato, “la juĝisto, kiun mi bone konas, estas absolute ne subaĉetebla, kaj se vi farus tion, certe la proceso ne estus gajnebla por vi.”

Jen, la komercisto efektive gajnis la proceson, kaj la advokato turnis sin al li, dirante: Bone, ke vi min obeis, ĉar alie vi estus malgajninta.”

“Ho!” respondis ridetante la venkinto, “mi ja tamen sendis anseron.”

“Ne eble!” respondis la advokato.

“Ho jes, sed mi almetis vizitkarton de mia kontraŭulo.”

Vivo tra la objektivo

Huang Xiaolong



47

Tri maljunuloj

Ĉirkaŭ la Printempa Festo de 2015, mi iris al malgranda montara vilaĝo en la malnova areo de Yimeng-monto en Linyi, Shandong. La vilaĝanoj tie estas malproksime de urboj kaj havas malmultajn ŝancojn komuniki kun la ekstera mondo. Iun tagon, teatra grupo venis en la vilaĝo por prezenti Liuĉino-operon, kaj la vilaĝanoj estis tre feliĉaj. Tri maljunuloj rigardis scivoleme la aktorinon ŝminkiĝi antaŭ la fenestro de la vestĉambro de la aktoroj. Mi kaptis la maloftan momenton per mia fotilo.



Maljunulo fumanta pipon

Bambua seka pipo havas historion de centoj da jaroj en kampara Ĉinio, kaj ĝi ankoraŭ estas fuma ilo kutime uzata en kampara Shandong provinco. Vilaĝanoj en montara regiono Yimeng ŝatas fumi pipon post vespermanĝo. Kiam mi vizitis montaran vilaĝon en Yimeng-monto, Linyi, Shandong-provinco

en 2015, mi kaptis la scenon de maljunulo fumanta bambuan pipon.



Adiaŭ, Shenzhen!

“Adiaŭ, Shenzhen!” estas foto, kiun mi faris antaŭ la Printempa Festo en 2017. La ĉefa persono de la foto estas mia amiko. Li estas la estro de kompanio en Shenzhen. Li kaj sia familio foriris Shenzhen por reveni al siaj hejmurbo en Shaanxi por la Novjaro. Shenzhen estas urbo de enmigrintoj. Antaŭ la Printempa Festo, homoj kaptas trajnojn kaj aviadilojn por reveni al siaj hejmurboj por festi la Novan Jaron, kaj Shenzhen fariĝas malplena urbo.

为了你将远行

沙 鸥 词

teksto de Sha Ou

杨海春 曲

muziko de Haicjo

杨海春 译配

esperantigita de Haicjo

1 = $E \frac{3}{4}$

Por via vetur' al foro

稍慢 lante



5 - 6 | 3 - 2 | 1 7 6 | 5 - 1 2 | 3 - - |

新 月 一 弯 像 条 小 船,
No - va lun' ki - el bo - a - tet'
街 灯 万 盏 连 成 银 线,
Strat-lam-poj vi - cas en ar - gent - li - ni'
天 安 门 前 宽 如 海 面,
Plac' Ti - an - men lar - ĝas ma - re

50



3 - - | 2 - 6 | 2· 3 2 | 5 - 3 | 6· 6 7 |

家 乡 天 空 哪 有 这 般 晶 -
Ti - a bril-blua l' ĉi - el' de la hom -
山 城 夜 市 哪 有 这 般 深
Kaj pli be - las ol mont - ur - bo en
家 乡 街 道 哪 有 这 般 平
kaj pli gli - tas ol stra - toj en hejm -



6 - - | 6 - - | 5 - i | 7 - 6 | 5 3 5 | 6 - - |

蓝? 为 了 你 将 远 行,
land' Por vi - a ve-tur'al for'
远, 为 了 你 将 远 行,
nokt' Por vi - a ve-tur'al for'
坦, 为 了 你 将 远 行,
lok' Por vi - a ve-tur'al for'



雪松书屋特别推荐

<http://shop.kongfz.com/41603>

